

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 3, n-ro 6 (18): marto-aprilo 2011
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Legantoj,

Ree komenciĝis nova jaro, jam la dek-unua post la laŭta celebrado de la komenco de la tria jarmilo. Kion la jaro 2011 alportos al Esperanto? Kion al la homaro? Ĉu tiu ĉi jaro signifos alian paŝon al pli da justeco, egalrajteco kaj paco por ĉiuj homoj kaj popoloj?

Ŝajne la idealo de la malgranda pol-juda kuracisto troviĝas same tiel for de ni kiel dum lia vivo. Jes, en Eŭropo ne plu furiozas militoj, kaj ĝiaj popoloj iom post iom paceme proksimiĝas unuj al la aliaj, sed alie en la mondo popoloj luktas por demokratio kaj libereco. Persona kaj kolektiva egoismo kaj potenco-manio baras la vojon al plibonigo.

Aliflanke gravaj naturproblemoj minacas la teron. Pro tiu situacio respondecas ni mem, kaj ni mem povas kaj devas solvi ilin.

Sed mi kredas, ke sen justeco, solidareco kaj seriozaj intervenoj la idealo de d-ro Zamenhof – pli bona mondo – neniam estos atingita.

Tamen ni esperu, ke tiu ĉi nova jaro kondukos nin al pli bona kaj pli bela mondo kaj feliĉeco por ĉiuj.

Multan legadplezuron!

Pieter Jan Doumen

Antaŭparolo de la Unua Libro (4) (Voorwoord to het Eerste Boek) (4)

Mi ankoraŭ diris nenion pri tio, ke vortaro de ekzistanta lingvo estas eksterordinare dika, kaj ke la serĉado en ĝi de du aŭ tri vortoj jam estas laciga, dum la vortaro de la Lingvo Internacia, danke al ĝia artikigita strukturo, estas eksterordinare malgranda kaj praktika; mi diras nenion pri tio, ke en ĉiu lingvo ĉiu vorto en la vortaro havas multajn signifojn, el kiuj vi hazarde elektas la konvenan vorton. Sed se vi imagas lingvon kun la plej ideala, simpligita gramatiko, kun fiksa, difinita signifo por ĉiu vorto, estas ĉiaokaze necese por alparolato, ke

li, helpe de vortaro, povu kompreni vian letereton, ke li ne nur estu studinta gramatikon, sed ankaŭ posedu ian lertecon povi orientiĝi en ĝi, distingi la radikojn de la gramatikaj finaĵoj en kunmetaĵoj kaj derivaĵoj ktp. Ĉar se vi sidas en trajnvagono kaj deziras demandi al via najbaro: “Kiom da tempo ni haltos en N**?”, vi certe ne proponos al li unue lerni la gramatikon de la lingvo! En la Lingvo Internacia ano de ia ajn nacio povas tuj kompreni vin, ankaŭ se li ne mastras tiun ĉi lingvon kaj eĉ neniam aŭdis paroli pri ĝi. Ĉiu, la vortaron en la mano, povas flue legi libron verkitan en la Lingvo Internacia sen la plej malgranda preparo, kaj eĉ sen devi legi antaŭe ian ajn antaŭparolon, en kiu estas eksplikita la uzo de la vortaro¹; sed persono kiu estas studinta, devas malmulte rifuĝi al la vortaro, kiel fariĝos klare ĉi-sube.



Se ekzemple vi deziras skribi leteron al hispano en Madrido, sed ne scipovas lian lingvon kaj li ankaŭ ne la vian, kaj se vi dubas, ĉu li scipovas la Lingvon Internacian aŭ eĉ neniam aŭdis pri ĝi, vi povas senzorge skribi al li, konvinkite, ke li komprenos vin! Ĉar danke al la artikigita strukturo de la Lingvo Internacia la tuta vortlisto, kiun oni bezonas por la ĉiutaga vivo, kiel vi povas konstati en tiu ĉi ekzemplero, kovras ne pli ol duonan folion, povas facile esti ŝovita en koverton kaj esti akirita en ĉia ajn lingvo por unu kopeko. Vi bezonas nur skribi vian leteron en la Lingvo Internacia, meti en la koverton ekzempleron de la vortlisto Lingvo Internacia-hispana, kaj la adresito komprenos vin, ĉar la vortlisto ne nur konsistigas la kompletan ŝlosilon por via letero, sed mem eksplikas sian celon kaj uzadon. Danke al la

¹ Ĉar ekzemploj de frazoj kaj vortaro estas aldonitaj al tiu ĉi broŝuro, la leganto povas tuj fari provon.



kiel eble plej larĝa kombinado de vortoj oni povas esprimi per tiu malgranda vortlisto ĉion kio estas necesa en la ordinara vivo; sed estas memkompreneble, ke vortoj kiujn oni malofte renkontas – tehnikaj vortoj (sed ankaŭ ‘fremdaj’ vortoj, kiujn supozeble ĉiuj scias, ekz. ‘tabako’, ‘teatro’, fabriko’ ktp.) ne estas transprenitaj en tiu ĉi vortlisto, tial, se vi nepre devas uzi tiajn vortojn, kaj ne eblas anstataŭigi ilin per aliaj vortoj aŭ tutaj esprimoj, tiam vi devas uzi la *plenan* vortaron, kiun ne eblas sendi al la adresito: tiam vi povas nur meti inter krampojn ilian tradukon en la lingvo de la adresito.

b) Kaj tiel mi povas, danke al la ĉi-supre eksplikita strukturo de la lingvo, komprenigi min al ĉiu ajn. La sola maloportunaĵo estos (ĝis la ĝenerala enkonduko de la lingvo), ke mi devas atendi ĉiufoje, ĝis mia kunparolanto estos analizinta miajn vortojn. Por limigi kiel eble plej tiun maloportunaĵon (almenaŭ en niaj rilatoj kun edukitaj homoj), mi procedis jene: la vortlisto kiun mi enmetis, ne enhavas derivaĵojn kaj konsistas kiel eble plej el vortoj kiuj ĉiuj edukitaj personoj konas. Kiel ekzemple vortoj kiuj estas uzataj sammaniere en ĉiuj civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn ‘fremdajn’ kaj ‘tehnajn’) mi transprenis sen ia ŝanĝo; el la vortoj kiuj sonas malsame en la diversaj lingvoj, mi prenis la vortojn kiuj estas komunaj en du aŭ tri gravaj eŭropaj lingvoj aŭ ekzistas nur en unu lingvo, sed estas popularaj eĉ ĉe aliaj popoloj; kiam iu vorto sonas malsame en ĉiuj lingvoj, mi provis trovi vorton kiu havas konvenan signifon aŭ maloftan uzon, sed kontraŭe estas konata ĉe la plej gravaj popoloj (ekz. la [rusa] vorto ‘*bliskij*’ sonas malsame en ĉiuj lingvoj; tial mi prenis la latinan vorton por ‘*blijajŝij*’ (*proximus*), kaj aperas, ke ĝi estas uzata en ĉiuj gravaj lingvoj sed kun diversaj signifoj; se mi do prenas la vorton ‘*proksim-*’, ĉiuj instruitaj homoj pli-malpli komprenas min); en la ceteraj kazoj mi kutime pruntis de la latina kiel duon-internacia lingvo. (Mi nur deviis de tiuj reguloj, kiam specialaj cirkon-

stancoj postulis tion, kiel ekz. por eviti homonimojn, pro ortografia simpleco ktp. Tiunmaniere mi rajtas esti konvinkita, ke ĉe korespondado kun duon-edukita eŭropano kiu tute ne scipovas la Lingvon Internacian, li ne nur komprenos min, sed ankaŭ ne speciale bezonos serĉi en la vortlisto, kiun li nur konsultos en kazo de dubo.

Post tiuj ĉi eksplikoj pri la karaktero de mia lingvo, mi aldonas ĉi tie kelkajn ekzemplojn¹ en la Lingvo Internacia por permesi al la leganto kontroli ĉion kion mi diris ĉi-supre.

1. Patro nia

Patro nia, kiu estas en la ĉielo. Sanktigata estu Via nomo. Venu Via regno. Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Ĉar Via estas la regno kaj la potenco kaj la gloro eterne. Amen.

2. El la biblio

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. Kaj Dio nomis la lumon tago, kaj la mallumon Li nomis nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno – unu tago. Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo. Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon kiu estas sub la firmaĵo, de la akvo kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la firmaĵon ĉielo. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago. Kaj Dio diris: kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu loko, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel. Kaj Dio nomis la sekaĵon tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo Li nomis maroj.

3. Letero

Kara amiko! Mi prezentas al mi, kian vizaĝon vi faros post la ricevo de mia letero. Vi rigardos la subskribon kaj ekkrios: “Ĉu li perdis la ŝagon? En kiu lingvo li skribis? Kion signifas la folieto, kiun li aldonis al sia letero?” Trankviliĝu, mia kara! Mia saĝo, kiel mi almenaŭ kredas, estas tute en ordo.

¹ La ekzemplojn 1, 2, 3 kaj 5 estas tradukoj de Zamenhof; 4 kaj 6 li mem verkis.

Mi legis antaŭ kelkaj tagoj libreton sub la nomo “Lingvo Internacia”. La aŭtoro kredigas, ke per tiu lingvo oni povas esti komprenata de la tuta mondo, eĉ se la adresito ne sole ne scias la lingvon, sed eĉ ankaŭ ne aŭdis pri ĝi; oni devas sole aldoni al la letero malgrandan folieton nomatan “vortaro”. Dezirante vidi, ĉu tio estas vera, mi skribis al vi en tiu lingvo, kaj mi eĉ ne unu vorton almetis en alia lingvo, tiel kiel se ni tute ne komprenus la lingvon de la alia. Respondu al mi, ĉu vi efektive komprenis, kion mi skribis. Se la afero proponita de la aŭtoro estas efektive bona, oni devas per ĉiuj fortoj lin helpi. Kiam mi havos vian respondon, mi sendos al vi la libreton; montru ĝin al ĉiuj loĝantoj de via urbeto, sendu ĝin al ĉiu vilaĝo ĉirkaŭ la urbeto, al ĉiu urbeto, kie vi havas amikojn aŭ konatojn. Estas necese, ke grandega nombro da personoj donu sian voĉon – tiam post la plej mallonga tempo estos decidita afero, kiu povas alporti grandegan utilon al la homa socio.

4. Mia penso

Sur la kampo, for de l' mondo,
Antaŭ nokto de somero
Amikino en la rondo
Kantas kanton pri espero.
Kaj pri vivo detruita
Ŝi rakontas kompatante,
Mia vundo refrapita
Min doloras resangante.

Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
La junecon – mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

“Ĉu vi dormas, ho, sinjoro,
Kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco?”
Kion diri? Ne ploranta
Povis esti parolado
Kun fraŭlino ripozanta
Post somera promenado!

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, –
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...



Se ne plaĉas al la sorto
Mia penso kaj laboro –
Venu tuj al mi la morto,
En espero – sen doloro!

5. El Heine¹

En sonĝo principon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro, –
Sub arbo verdanta ni sidis,
Tenante nin koron ĉe koro.

“De l' patro de l' via la krono
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for lia sceptro kaj trono –
Vin mem mi deziras, aminda!”

“Ne eble!” ŝi al mi rediras:
“En tombo mi estas tenata,
Mi nur en la nokto eliras
Al vi, mia sola amata!”

6. Ho, mia kor’

Ho, mia kor’!
Ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor’!

Ho, mia kor’!
Post longa laborado
Ĉu mi venkos en decida hor’?
Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor’!

(D-ro Zamenhof, trad. P.J.D.)

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Francio 1 – *E-o en interpretista trejnado* –

La 15-an de februaro 2011 en la universitato pri interpretado la strasburga klubo bonvenigis Nicole Foss, kunredaktantinon de *Automatic Earth*. Ŝi prelegis en la angla, la studentoj

¹ Heinrich Heine, germana poeto (1797-1856)

interpretis en la francan, kaj Istvan Ertl kaj Cyrille Hurstel, sekretario de la strasburga klubo de Esperanto, interpretis en Esperanton. Oni povis meti demandojn per iu ajn el la tri lingvoj! La aranĝo estis parto de la oficiala trejnado de la studentoj kiel interpretistoj kaj estis kunorganizita de la universitato de Strasburgo kaj de la “Cirklo de la Katedralo”, asocio kiu kunigas ĉiujn asociojn kiuj rilatas kun la eŭropo de Strasburgo. La evento estis do larĝe malfermita al multe da tavoloj de la socio.

(Edukado-net tra Germain Pirlot)

Francio 2 – Esperanta gramatika kontrolilo –

La gramatika kontrolilo Lingvollo 1.2 (LanguageTool-1.2) estas havebla ekde pli ol unu jaro (2010/01/02) kaj nun ankaŭ funkcias por la Lingvo Internacia inter multaj aliaj lingvoj. Lingvollo estas libera (GPL) plurlingva gramatika kontrolilo por OpenOffice. Tio estas: ĝi atentigas pri gramatikaj eraroj kiel ekzemple: “Mi lernas *Esperanto* (mankas la akuzativo)”. Lingvollo ne atentigas pri literumaj eraroj kiel “Mi lernas Espernaton”, sed eblas uzi literuman kontrolilon kune kun la gramatika kontrolilo por atentigi pri ambaŭ tipoj de eraroj. Lingvollo ankaŭ funkcias el komanda linio por tiuj, kiuj preferas ne uzi OpenOffice.

Pli da informoj (ekz. ekranfotoj, instrukcioj por instalado, ktp.) oni trovas ĉi-sube: <http://dominiko.livejournal.com/tag/lingvollo>; hejmpaĝo: <http://www.languagetool.org>. Elŝutebla dosiero de Lingvollo-1.2: <http://www.languagetool.org/download/LanguageTool-1.2.oxt>. Espereble iu(j) trovos ĝin utila!


Dominique Pellé

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Hungario – Kantaro-vikio: 2000 tekstoj –

Ekde la jaro 2003 la kantaro-vikio – alinome la “libera kantaro” – estas loko kie eblas trovi multegon da kantotekstoj, notoj, videoj kaj aliaj muzikaĵoj. Funkcia kiel vikio, ĝi ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj.

En la komenco la kantaro-vikio havis nur kantotekstojn, sed la vivo ne staras unuloke, kaj nun krom tekstoj oni povas trovi ankaŭ muziknotojn, akordojn, tonsilabajn melodiojn, midi-dosierojn kaj ankaŭ spekti videojn. En la kantaro-vikio trovis sian duan vivon ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kun kantotekstoj.



Iniciatinto, ĉefa kunlaboranto kaj multjara motoro de la projekto estas Ljoŝa Kuznecov el Rusio. Multan kaj sinceran dankon al li!

Kiuj uzas la kantaro-vikion? Ho! Komentoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj ludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj kaj finfine ĉiuj muzikemuloj! Se vi antaŭe ne vizitis nian vikion, ne prokrastu: eble vi trovos ĉe ni delonge serĉatan amatan kanton! Adreso de la libera kantaro: <http://kantaro.ikso.net/>.


(Ret-info, Eventoj, Hungario)

Esperantio – Du novaj filmoj pri Esperanto –

En 2011 ni povas atendi du profesiajn dokumentajn filmojn pri Esperanto: unu en la franca kaj unu en la angla. En ambaŭ kazoj la reĝisoroj estis jam konataj pro alitemaj dokumentaj filmoj: la franco Dominique Gautier kaj la usnano Sam Green, kiu jam pritraktis Esperanton en la filmo “Utopia In Four Movements” (Utopio en kvar movoj). Klarigoj pri ili aperos ĉe [Esperanto-filmo](#) kaj ĉe [Filmoj.net](#).

La titolo de la filmo de Dominique Gautier ankoraŭ ne estas konata, sed tiu de la filmo de Sam Green estas *The Universal Language*. Sam Green jam filmis eventojn en rilato kun Esperanto, i.a. Universalajn Kongresojn, ekz. en Jokohamo. Li intervjuis i.a. prof. Humphrey Tonkin, kaj la aŭtorinon de la libro *In the Land of Invented Languages* (En la lando de la inventitaj lingvoj), Arika Okrent. Tre leginda intervjuo de Sam Green fare de Chuck Smith, la fondinto de la Esperanto-versio de *Wikipedia*, aperis la 22-an de januaro ĉe Libera Folio sub la titolo “Nova dokumenta filmo pri Esperanto”. Aperas el ĝi, ke Sam Green havas pozitivan opinion pri Esperanto.

(Henri Masson, Francio)



Aŭstralio – *Esperanto en anglalingva lando* –

La unua ministro de Aŭstralio kiu unufoje diris kelkajn kuraĝigajn vortojn (eble iom malerte) pri Esperanto en la mondo, estis la ministro pri edukado, Conybeer, dum la 1-a Aŭstralia Esperanto Kongreso en 1911. Fortan kaj longdaŭran subtenon donis poste Meredith Atkinson, profesoro pri ekonomio en la Melburna Universitato, kiu poste ekŝiĝis el la universitato kaj dum kelkaj jaroj, ĝis sia morto, donis senavare lokon al Esperanto en sia gazeto *Stead's Review*. Gravan sukceson signifis la Esperantaj kaj poresperantaj paroladoj de R.R. Rawson el la radiostacio en Melburno, unufoje ĉiumonate dum kelkaj jaroj.

La afero iom plivigliĝis ekde la dua duono de la pasinta jarcento. Aperis sufiĉe famaj homoj, kiel ambasadoro Ralph Lindsay Harry (1917-2002), kaj la eksministro Kep Enderby, kiuj ambaŭ scipovis kaj subtenis Esperanton. Ralph Harry kontribuis al la redaktado de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. En 1983 li publikigis libron sub la titolo "The Diplomat Who Laughed" (La Diplomato kiu ridis) (elŝutebla en pdf). Juĝisto kaj ministro Kep Enderby eklernis Esperanton en 1987 kaj okupis diversajn funkciojn en la Esperanto-movado. Li estis prezidanto de la UEA de 1998 ĝis 2001. Konsultindaj retpaĝoj: [Aŭstralia Esperanto-Asocio](#), [Aŭstraliaj instruistoj de Esperanto](#).

(Henri Masson, Francio)

Usono – *11 E-istoj reprezentas UEA ĉe UN* –

Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda

organizaĵo rajtigilojn por dek unu reprezentantoj en la kalendaraj jaro 2011.

Ĉe la ĉefa sidejo de UN en Nov-Jorko la ĉef-representanto de UEA estas prof. Humphrey Tonkin. Aldonaj reprezentantoj estas Neil Blonstein, Thomas Eccardt kaj Scott Page. Blonstein krome laboras kiel volontulo en la Novjorka Oficejo de UEA.

En Vieno la ĉef-representanto de la asocio estas Hans Michael Maitzen, dum Gregor Hinker kaj Stella Maizen estas aldonaj reprezentantoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, Stefano Keller, estas la ĉef-representanto en la UN-oficejo de Ĝenevo, asistata de Charmian Common, Nicole Margot kaj Francesco Reale.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Belgio – *Kiel helpi la indonezian movadon?* –

Du instruvojaĝoj al Indonezio havas kiel sekvon, ke nun en pluraj insuloj estas homoj kiuj scias pri Esperanto kaj eĉ eklernis ĝin. En du urboj estas aktivaj kluboj, kaj en aliaj urboj oni provas starigi klubon aŭ almenaŭ kune lernas la lingvon. Tamen la movado en Indonezio estas ankoraŭ nek granda nek forta, kaj bezonas helpon. Estas pluraj manieroj fari tion:

Eblas sendi librojn al la kluboj, precipe anglalingvajn lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankaŭ bazajn librojn (ekz. PIV, la Fundamento aŭ malgrandaj (bild)vortaroj. Petu min pri la adresoj.

Alia ebleco estas helpi 'kanutigi' indonezianojn. Estas pli da indonezianoj kiuj meritas fariĝi UEA-membro, ol la Fondaĵo Canuto povas subteni. Pluraj el tiuj indonezianoj jam sciigis al mi, ke, se ne eblas ricevi paperan abonon al la revuo Esperanto, por ili sufiĉas ricevi retan. En tiu kazo membriĝo kosta nur 12 eŭrojn kaj eblas donaci ĝin al pli da homoj. Se vi volas tion fari, bonvolu ĝiri vian subtenon al la Fondaĵo Canuto kun la mencio 'por indonezianoj'.

Alia plano estas venigi almenaŭ unu indoneziano al UK kaj IJK ĉi-jare. Pluraj indonezianoj jam revas pri UK aŭ IJK kaj pretas mem kontribui, sed la tuta kosto estas simple tro alta por ili. Helpu ilin kaj ĝiru kontribuon al la konto 'azio' de UEA kun la mencio 'indonezianoj al UK/IJK', por ke, fine, denove estu iu grandega lando en niaj plej gravaj kongresoj. Antaŭdankon ilianome. Pliaj informoj ĉe: heidi.goes@gmail.com.

Heidi Goes.
(Henri Masson, Francio)

La avantaĝo de multlingvismo

(Het voordeel van veeltaligheid)

Antaŭ pli ol jarcento, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Dresdno en 1908, la rumana industriisto Henri Fischer-Galati rakontis jenan personan sperton, kiun li havis en 1903:

“Dum vojaĝo al la Ekstrema Oriento mi sidis en la restoracivagono de la trajno Bukaresto-Istambulo. Apenaŭ instalite, mi rimarkis, ke alia vojaĝanto vane provis komprenigi al la kelnero, kion li deziras. Tiucele la kelnero uzis ĉiujn siajn lingvosociojn; li parolis la rumanan, la serban, la turkan, la bulgaran kaj la rusan. Ve! La fremdulo komprenis nenion. Preta doni al li helpan manon, mi proksimiĝis – ekster la rumanan, mi parolas sep lingvojn – kaj demandis lin germane, france, angle, itale, hungare, hispane kaj greke, ĉu mi povus helpi lin. Sed vane. La fremdulo komprenis neniun el tiuj dek du lingvoj. Tiam mi memoris ĵurnalan artikolon pri Esperanto, kiun mi legis iom da tempo antaŭe, sed sen kredi ĝin. Mi finis do per la demando: “Ĉu vi parolas Esperanton?” Ĝojkrio respondis min: “Jes, mi parolas Esperanton!” Kaj li plu parolis lingvon, kiun mi miavice ne komprenis, ĉar mia scio pri tio lingvo tiam limigis je tiu sola frazo. Tuj kiam la fremdulo rimarkis mian nescion pri tiu lingvo, li metis en mian manon la libreton “Ŝlosilo de Esperanto”, unu el tiuj kiuj ekzistas en la plej multaj lingvoj. Malgraŭ ĝia malgrandega pezo, tiu ĉi libreto enhavas la tutan gramatikon kaj vortaron de la Lingvo Internacia. Mi tuj komencis studi ĝin, kaj du horojn poste, kiam ni retrovis nin sur la ferdeko de boato, mi jam povis komprenigi min en Esperanto.”

La industriisto finis sian rakonton, dum ridegis la tuta ĉeestantaro: “Tiel mi eksciis, ke mia nova amiko estas svedo kaj parolas kvar lingvojn: la sveda, la dana, la norvega kaj la finna. Ni tri – la kelnero, la fremdulo kaj mi – sciis dek ses lingvojn sen pro tio povi kompreni nin!” *(Henri Masson, Francio)*

Rezisto kontraŭ la angla kreskas

(Weerstand tegen het Engels neemt toe)

Laŭ la Franca Gazetara Agentajo AFP la franca sindikato ALTER de la teĥnika flugpersonaro de Air France finfine venkis en proceso kontraŭ la ĉefa flugkompanio de Francio en afero koncernanta la devigan uzon de la angla por teĥnika dokumentaro. La pilotoj ja scipovas la anglan, sed postulas



francilingvan tradukon de anglalingvaj dokumentoj.

Dokumentara filmo de Canal+, dissendita la 22.01.2010, atribuis la akcidenton de supersona aviadilo Concorde al mankanta peco, kies funkcio estis teni paralelaj la radojn de la subekipaĵo. La teĥnikistoj, kiuj ne komprenis la anglan dokumentaron, ne muntis tiun pecon, kies nepran neceson ili ankaŭ ne komprenis.

Komence de la jaro 2000 en la malsanulejo de Epinal, pro eraro en la nuranglalingva dokumentaro de aparato por radioterapio, 5500 pacientoj suferis pro ekcesa dozo de radiado (20% ĝis 30% troe). Kvin el ili mortis pro tio.

Louis Schweitzer, prezidanto de Renault (kiu kunlaboris kun Toyota en Japanio), estis devigita nuligi sian decidon uzi la uson-anglan en la protokoloj de la kunvenoj. Li eĉ lanĉis la Fondajon Renault por havigi stipendiojn al japanaj studentoj por lerni la francan lingvon. Li deklaris: “La lingvo estas malfacilaĵo iom supera al tio, kion ni opiniis. Ni elektis la anglan, kiel lingvon de la alianco, sed tio aperis esti handikapo kun ambaŭflanka reduktiĝo de la produktiveco.”

Ĵurnalista demandis al Jean-François Dehecq, prezidanto de Sanofi-Aventis, kiu estas la oficiala lingvo de la firmao. Li respondis: “Certe ne la angla. Multnacia firmao estas entrepreno en kiu ĉiu povas paroli sian propran lingvon. Dum kunveno oni bezonas la cerbon de la homoj. Se vi devigas ilin paroli la anglan, la anglosaksoj alvenas kun 100% de siaj kapabloj; la homoj kiuj parolas ĝin bone kun 50%; kaj la plimulto kun 10%. Se ni volas esti ĉiuj anglosaksoj, ni ne miru, ke la anglodaksoj estas la gajnantoj.”

(Henri Masson, Francio)

Ĉu vi dormas tro malmulte?

(*Slaapt u te weinig?*)

Sciencaj esploroj montris la rilaton inter tro mallonga nokta ripozo kaj la risiko de antaŭtempa morto. Homoj kiuj dormas malpli ol ses horojn dum la nokto havas 12% pli da ŝanco morti frutempe, ol tiuj kiuj dormas dum ses ĝis naŭ horoj. Tio aperas el studo de la brita universitato de Warwick. La studo ankaŭ pruvas, ke regule dormi tro longe (pli ol naŭ horojn) ankaŭ estas kaŭzo de maltrankvileco. La esploristoj emfazas, ke dormi tro longe ne plialtigas la riskon de frutempa morto, sed ke ĝi povas esti simptomo de ia grava malsano. Ankaŭ tro mallonga dormo povas esti kaŭzita de ia malsano. La studo estis farita en Britio, Usono, Orient-Azio kaj en pluraj aliaj eŭropaj landoj. Sume 1,3 milionoj da homoj, kiujn oni sekvis dum 25 jaroj, partoprenis en la esplorado. “Nokta ripozo de ses ĝis ok horoj estas do ideala por bona sano,” konkludas profesoro. Francesco Cappiccio de la universitato de Warwick. (*Tips Magazine*)

Nia rakonto:

La bebo de Désirée (2)

(*Ons verhaal: De baby van Désirée*) (2)

Kiam la bebo havis proksimume tri monatojn, Désirée vekiĝis kun la konvinko, ke estas io en la aero kio menacas sian trankvilecon. En la komenco tio estis tro subtila por kompreni. Estis matrankviliga impresio: iu mistera etoso inter la nigruloj; neatendataj vizitoj de malproksimaj najbaroj, kiuj apenaŭ povis pravigi sian viziton. Tiam okazis stranga, terura ŝanĝo en la manieroj de sia edzo, kiun ŝi ne kuraĝis peti lin ekspliki. Kiam li parolis al ŝi, li faris tion kun forturnitaj okuloj, el kiuj la malnova amlumo ŝajnis esti malaperinta. Li ofte forestis de ilia domo, kaj kiam li estis hejme, li evitis ŝian ĉeeston kaj tiun de ŝia infano sen ekskuzi sin. Kaj la vera spirito de satano ŝajnis posedi lin en lia interrilato kun la sklavoj. Désirée sentis sin sufiĉe mizera por morti.

Iun varmegan posttagmezon, ŝi sidis en sia ĉambro en sia negliĝo, glitigante inter siaj fingroj la buklojn de sia longaj, silkecaj, brunaj haroj, kiuj pendis ĉirkaŭ ŝiaj ŝultroj. La bebo, duonnuda, dormis en lia propra granda mahagona lulilo, kiu similis al luksa trono kun ĝia satenkovrita baldakeno. Unu el la kvarteronaj knabetoj¹ de Blanche staris ĉe la lulilo ventu-

mante la bebon per ventumilo el pavoplumoj. Distrita kaj malĝoja Désirée fikse rigardis la bebon, provante penetri tra la minacantan nebulon, kiun ŝi sentis envolvi ŝin. Ŝi rigardis de sia bebo al la nigra knabeto, kiu staris flanke de li, kaj ree, ĉiam denove. “Ah!” Estis krio, kiun ŝi ne povis retenigi kaj eligis nekonscie. La sango fluis tra ŝiaj vejnoj kvazaŭ glacio, kaj ŝvito ekkovris sian vizaĝon. Ŝi provis paroli al la malgranda kvarterona knabo, sed nenia sono komence eliris el ŝia buŝo. Kiam li aŭdis sian nomon, li rigardis supren kaj vidis, ke lia mastriro montris la pordon. Li demetis la grandan, dolĉan ventumilon kaj obeeme foriris per siaj nudaj piedfingroj sur la polurita planko.

Ŝi restis senmova, ŝian rigardon fiksitan sur la infano; ŝia vizaĝo estis bildo de teruro.

Tiam ŝia edzo eniris la ĉambron, kaj sen atenti pri ŝi, iris al tablo kaj komencis serĉi ion inter la paperoj, kiuj kovris ĝin.

“Armand,” ŝi kriis al li per voĉo kiu ponardus lin, se li estus homa. Sed li tute ne reagis. “Armand,” ŝi diris denove. Tiam ŝi ekstaris kaj ŝanceliĝante iris al li. “Armand,” ŝi haletis ankoraŭfoje, “rigardu nian infanon. Diru al mi, kion tio signifas.”

Malvarme li liberigis sian brakon el ŝiaj fingroj kaj forpuŝis ŝian manon. “Diru al mi, kion tio signifas!” ŝi ekkriis malespere.

“Tio signifas,” li respondis moke, “ke la infano ne estas blanka. Tio signifas, ke vi ne estas blanka.”

Rapida kompreno de tio, kion signifis tiu grava akuzo por ŝi, donis al ŝi nekutiman kuraĝon nei tion. “Tio tute ne estas vera, mi estas blanka! Rigardu miajn harojn, ili estas brunaj; kaj miaj okuloj estas grizaj, Armand, vi scias, ke ili estas grizaj! Kaj mia haŭto estas blanka, pli blanka ol la via, Armand,” ŝi ridis histerie.

“Tiel blanka, kiel la haŭto de Blanche,” li kruele replikis, and foriris, forlasante ŝin sola kun ŝia infano.

Kiam ŝi povis teni plumon en sia mano, ŝi sendis malesperan leteron al sinjorino Valmonde.

“Mia patrino, oni diras, ke mi ne estas blanka. Armond diris al mi, ke mi ne estas blanka. Pro Dio, diru al li, ke tio ne estas vera. Vi scias, ke tio ne estas vera. Mi mortos, mi devas morti. Mi ne povas esti tiel malfeliĉa kaj vivi.”

La respondo kiu venis, estis mallonga:

“Mia kara Désirée, revenu hejmen al Valmonde, ree al via patrino, kiu amas vin. Venu hejmen kun via infano.”

¹ Infano de blankulo kaj mulatino.

Kiam la letero atingis Désirée, ŝi iris kun ĝi al la kabineto de sia edzo kaj metis ĝin malfermita sur la skribtablon antaŭ kiu li sidis. Ŝi similis al ŝtona statuo: silenta, blanka, senmova.

Silentante, li glitigis siajn malvarmajn okulojn sur la skribitaj vortoj. Li diris nenion. “Ĉu mi iros, Armand?” ŝi demandis lin akratone en kruela necerteco.

“Jes, iru.”

“Ĉu vi deziras, ke mi foriru?”

“Jes, mi deziras, ke vi foriru.”

Li pensis, ke la Ĉiopova Dio traktis lin kruele kaj maljuste, kaj iel sentis, ke li repagas Lin egalmaniere, kiam li tiel ponardis sian edzinon en la animon. Krom tio, li ne plu amis ŝin pro la nekonscia damaĝo, kiun ŝin kaŭzis al lia domo kaj nomo.

Ŝi forturnis sin de li kvazaŭ sensentigita per forta bato kaj malrapide promenis al la pordo, esperante, ke li revokos ŝin.

“Adiaŭ, Armand,” ŝi murmuris.

Li ne respondis. Tio estis lia lasta bato al la sorto.

Désirée iris preni sian infanon. Zandrine estis promenanta kun li tra la sombra galerio. Ŝi prenis la etulon el la brakoj de la vartistino kun nenia klariga vorto kaj, malsuprenirante la ŝtupojn, foriris sub la kverkobranĉoj.

Estis iu oktobra posttagmezo. La suno estis subiranta. Sur la kampoj la negroj estis rikoltantaj kotonon.

Désirée ne estis ŝanĝinta la maldikan blankan robon kaj la malpezajn pantoflojn, kiujn ŝi surhavis. Ŝiaj haroj ne estis kovritaj, kaj la sunradioj ĵetis orecan brilon sur ŝiajn brunajn buklojn. Ŝi ne elektis la larĝan, malmolan vojon, kiu kondukis al la malproksima plantejo de Valmonde, sed promenis tra dezertan kampojn, kie stoploj vundis ŝiajn delikatajn piedojn kaj disŝiris sian robon.

Ŝi malaperis inter la kanoj kaj salikoj, kiuj dense kreskis sur la bordoj de la profunda, malrapida bajoro¹, kaj ŝi ne revenis.

Kelkajn semajnojn poste stranga sceno estis ludata en L'Abri. En la centro de la purigita malantaŭa korto brulis granda fajro. Armand Aubigny sidis en la larĝa enirejo, de kiu li povis bone vidi la spektaklon. Al duondekduo da negroj li disdonis la materialon, kiu tenis la fajron brulanta.

Gracia salika lulilo kun ĉiuj ĝiaj garnituroj estis metita sur la fajron, kiu jam estis nutrita

¹ Senmova malgranda branĉo de granda rivero.

La Limburga Esperanto-Asocio

Aktivaĵoj en januaro kaj februaro 2011:

Ĵaŭdon, la 27-a de januaro:

Jan Doumen prelegis pri la Limburgaj dialektoj (ĉirkaŭ 600 diversaj specoj!), kiujn, de okcidente orienten, oni parolas de Tienen en Belgio ĝis Wuppertal en Germanio, en kiu lando oni nomas ilin ankaŭ limburgaj dialektoj.

Ĵaŭdon, la 24-an de februaro: Nin vizitis Toine Gremmen kaj Ralph Schmeits de la klubo de Eindhoven. Ralph prezentis al ni la broŝuron “Ontdek het Esperanto”, la novan reklamilon faritan de ILEI, kiun li tradukis en la nederlandan lingvon. Poste An Olijlagers gvidis skrabloludon. Ok personoj partoprenis en kvar paroj. La paro An Olijlagers kaj Rik Leijskens gajnis kun granda antaŭeco: ili kunigis 180 poentojn!

Aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2011:

Ĵaŭdon, la 31-an de marto:

Jan Doumen gvidos Esperanto-kantovesperon. Paul Hotterbeekx akompanos la kantojn sur sia gitaro.

Ĵaŭdon, la 28-an de aprilo:

Henri Schutters gvidos la ludon “Divenu la Esperantan vorton”.

La estraro de LEA tutkore invitas ĉiujn siajn membrojn al siaj aktivaĵoj. Ne hezitu veni kaj subteni niajn klopodojn disvastigi la Lingvon Internacian!

per riĉa, multekosta vindujo. Tiam venis silkaj roboj, veluraj kaj satenaj vestaĵoj, puntaĵoj kaj brodaĵoj, mufoj kaj gantoj, ĉar la novedzina korbulo estis de malofta kvalito.

La lasta afero ĵetenda en la fajron estis maldika paketo da leteroj; senkulpaj malgrandaj skribaĵoj, kiujn Désirée sendis al li dum la tagoj de ilia gefianĉeco. Estis alia letero en la sama tirkesto, el kiu li prenis tiujn leterojn. Sed ĝin ne skribis Désirée; estis letero de lia patrio al lia patro. Li legis ĝin. Ŝi dankis Dion pro la beno, kiu estis la amo de ŝia edzo al ŝi. “Sed antaŭ ĉio,” ŝi skribis, “mi dankas la bonan Dion pro tio, ke li aranĝis niajn vivojn tiel, ke nia kara filo Armand neniam ekscios, ke lia patrio, kiu adoras lin, apartenas al la raso, kiu estas stampita per la brulmarko de sklaveco.”

(K. Chopin, trad. P.J.D)